



EKO 2016-12, aprilo 17, sendita el Kopenhago, nur tekste; PDF postkreita en la 14a de majo.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

Flama prilumo de ebloj por la dana movado

Tuj post la malfermo de la kunsidado pro la 108a jarkunsido de Dana Esperanto-Asocio en Odense, la temo transiris al diskutado de la rolo kaj laboro de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Al tiu publiko kun tioma historio, minimumis la bezono klarigi la bazajn strukturojn de la asocio, kaj la plimulto de la horo estis malferma por demandoj kaj komentoj el la dudek-persona publiko. La gvidon ricevis la aranĝa gasto, la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill. Frua demando estis pri la kapablo de la movado altiri junulojn; nome en kiuj mondpartoj troveblas kontentiga kvanto da junuloj? Respondoj: ĵusa sperto montris, ke floras junulara agado en Nepalo kaj Indonezio, AMO 4 en Siano atestis multajn junulojn en Ĉinio, dum la 102a UK oni povos mem konstati la forton en Koreio. En Ameriko, elstaras Brazilo. La situacio plej akutas en Eŭropo, kie inter la sekcioj de TEJO pleje videblas Pollando, Hungario kaj Italio. Esprimiĝis malkontento pri la alta kosto de Universalaj Kongresoj. Alia demando: kion faras UEA kaj ILEI por starigi kontakton kun la finlernintoj de la kursidaro Duolingo. Plia demando, pri la financado de atañenigaj laboroj: respondo, tridek-elcenta kresko tra tri jaroj de la sumo por Movada Evoluigo, kun intenco daŭrigi tion tra tri pliaj jaroj. Entute pozitiva interŝanĝa sesio.



Sekvis la malfermo de la 24a Seminario pri Aktivula Maturigo, per lumbilda resumo de la programo tra la jaroj 2014 kaj 2015. La enhava parto de la seminario konsistis el FLAM-analizo pri la stato de la movado kaj E-komunumoj en Danlando, kaj iugrade tra Skandinavio.

Post diskutoj en tri etaj grupoj (vidu la foton), komuna sesio kunrastis la konkludojn. La teksta komunikado prezentis la kompilitajn rezultojn. Ni forfaligas tiun tekston en la nuna postkreita PDF-versio, ĉar ĝi aperas en du paĝoj fine de EKO 2016-13 en ilustrita prezento.

Vortoj: 314

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikadojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA_FA...

PDF postfarita en la 14a de majo per Nuance Power PDF.